

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-RO 552 (11) Nov. 1951



Nia Prezidanto resaniĝis

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.
Urgajn informojn sendu rekte
al Rickmansworth

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Jara abono (1952) : 15 ŝil. angla (kun
membrecio kaj jarlibro 20 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6	½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil.	⅓ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kuponon por ĉiu du da vortoj

Legantoj en 74 landoj

Eldonnumero 6000

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represadon al nia redakcio.



Enhavo

Specialaj artikoloj :

	paĝo
Parolas la Prezidanto de U.E.A. : <i>E. Malmgren</i>	265
Internacia Lingvo Serĉata por Aviado	266
Post Kvar Jaroj (Instruado en Lernejoj) : <i>V. C. Nixon</i> . . .	269
Du Sukcesaj Arkeologiaj Tendaroj : <i>J. Vesterland-Andersen</i> ..	271
La Manĝado kaj la Sano : <i>J. W. Leslie</i>	273
Valora Esperimento (konkurso por lernantoj) : <i>C.C.G.</i>	279

la 37-a Universala Kongreso de Esperanto :

Gvidfolio pri Oslo	aldono
----------------------------	--------

Konstantaj Rubrikoj :

Enigmo Konkurso N-ro 62	281
Esperantista Vivo	282
Felietono "La Alaska Stafeto" : <i>F. Omelka</i>	283
Internacia Konkurso 1951	266
Nia Forumo	286
Niaj Kunlaborantoj : <i>Laurids Jakobsen, Danlando</i>	272
Oficiala Informilo	288
Por via distro	278
Radio kaj Esperanto	287
Tra la Librero	276
Tra la Mondo Esperantista	267

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 552 (11)

Novembro 1951



Parolas la Prezidanto de U.E.A.

NOVA laborjaro komenciĝis. Post libertempo, post ekskursoj, post kongresvojaĝoj la esperantistoj nun rehavis entuziasmon kaj estas pretaj denove labori por disvastigi la internacian lingvon.

Persone mi ne havis la plezuron renkonti gesamideanojn, sed kiel resaniĝanto ripozis kaj rehavigis fortojn post longa malsano. Kiam mi nun sentas min preta denove aktive partopreni la laborojn de la Esperanto-movado, mi deziras esprimi koran dankon al la vicprezidanto de U.E.A., d-ro P. Kempeneers, kiu en lerta maniero funkciis kiel prezidanto dum tuta jaro. Li—en bona kunlaboro kun la aliaj estraranoj—daŭrigis la evoluon de nia movado.

Dum la pasintaj monatoj mi havis sufiĉe da tempo por pripensi mian laboron por Esperanto. Kiel multaj aliaj mi agis en diversaj manieroj kaj okupis diversajn oficojn. Kio el tio estis la plej valora? Kio donis al mi, kiam mi kuŝis ligita al la malsanula lito, pli da kontento ol io alia, aŭ eble mi diru: iom da kontento pri mia Esperantista agado? Nu, estis la organizado de la grupvojaĝoj—ne nur al la kongresurboj sed ankaŭ al aliaj vidindaj lokoj kaj landoj. Ĉar per tiuj vojaĝoj la partoprenantoj, entute kelkaj miloj, vere havis utilon, plezuron, rekompencan de la Esperanto-studoj. Kaj tiuj partoprenantoj, kiuj ne estis Esperantistoj, ekhavis fortan impreson pri la valoro de la internacia lingvo. Mi do sentis, ke mi kaŭzis ĝojon al la homoj. Kaj ĉu la ĝojo ne estis sufiĉe grava por la homa vivo?—La vivo, kiu bedaŭrinde ofte estas tiel prema, malfacila, suferiga, doloriga!

Tiuj pensoj nun instigas min alvoki al la Esperantistoj kaj speciale al la gvidantoj: Aranĝu tiel ke Esperanto estos tia ilo, ke ĝi kunhelpas por krei ĝojon kaj bonan volon inter la homoj!

Jen mia unua alvoko al la Esperantista mondo, kiam mi nun denove okupas la postenon de prezidanto.

E. Malmgren.



Internacia Lingvo Sercata por Aviado

DUM la lasta tempo ICAO (Internacia Civila Aviada Organizaĵo) multe diskutis la problemojn de lingvo en la aertrafiko, precipe konsiderante la problemojn kiuj evidentiĝis en la uzo de la angla lingvo kiel la oficiala internacia lingvo por la aviado.

En konferenco de la Komunikada Sekcio de ICAO, en Montreal, Kanado, 24 Aprilo–2 Junio 1951, oni rekomendis al ĉiu ŝtato reprezentata en ICAO, ke oni starigu esploradon pri la redaktado de aviada internacia lingvo surbaze de la angla. Laŭ tiu rekomendo oni celas aliformigon de la angla lingvo kun laŭebla enmikso de latindevenaj vortoj kaj elbaro de anglaj vortoj kiuj estas malfacile prononceblaj por ne-angloj. Unuavide tio ŝajnas esti vana klopodo naski hibridan lingvon, sed oni jam

spertis kiom da fantazio povas okazi sur la lingva kampo malgraŭ la fakto ke jam ekzistas multjare pruvita solvo en Esperanto.

Aparte grava por ni estas la jena diro en ĝia raporto (DOC. 7171-COM/544) :—

“... La Sekcio konsideris, ke la kreo de tute artefarita lingvo estas projekto tro akademia kaj verŝajne ne atingus bonajn rezultojn aŭ la necesan kunlaboron en plenumiĝo kiu estas esenca por la sukceso de tia klopodo.” (p. 288)

El tio estas tute evidente, ke la Sekcio aŭ ignoris aŭ ne konscias pri la atingoj de Esperanto. Estas tre dezirinde, ke ĉiu Esperantisto skribu al la Sekretario de Sekcio ILA, ICAO, Montreal, atentigante pri la ekzisto kaj disvasteco de nia lingvo.

C. C. Goldsmith, Ĝen. Sek.

Internacia Konkurso, 1951

Stato je la 30a de Septembro 1951

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Maroko ..	400	650	162.5
2. Portugalujo ..	600	935	155.8
3. Brazilo ..	2500	3857	154.3
4. Sud-Afriko ..	250	340	136.0
5. Germanujo ..	2400	3220	134.2
6. Finnlando ..	2000	2665	133.2
7. Italujo ..	1700	2060	121.1
8. Izraelo ..	300	360	120.0
9. Belgujo ..	2100	2356	112.2
10. Norvegujo ..	1400	1569	112.1
11. Japanujo ..	800	875	109.4
12. Urugvajo ..	250	265	106.0
13. Britujo ..	12000	12406	103.4

14. Svislando ..	1400	1445	103.2
15. Hispanujo ..	1100	1105	100.4
16. Svedlando ..	5300	5261	99.3
17. Nederlando ..	5000	4893	97.8
18. Francujo ..	5700	5517	96.8
19. Danlando ..	2800	2670	95.3
20. Aŭstralio ..	900	820	91.1
21. Nov-Zelando	800	710	88.7
22. Kanado ..	250	220	88.0
23. Usono ..	3000	2477	82.5
24. Argentino ..	800	640	80.0
25. Irlando ..	250	195	78.0
26. Aŭstrujo ..	1000	777	77.7
27. Islando ..	500	360	72.0
28. Kubo ..	250	145	58.0



Tra la Mondo Esperantista



Aŭstrujo

Ŝtata subvencio. La instrumisterio subvenciis la Instruistan Sekcion de Aŭstria Esperantista Federacio per aŭs. ŝil. 1000. Pasintjare Esperanto estas instruita en pluraj lokoj (vidu jarlibron, 2-a parto.)

Brazilo

Bauru. La urbkonsilanto D-ro Climerio Mozer, prezentis al kunsido de urbkonsilantaro en Bauru, projekt-on konsiderante la Esperantistan Grupon kiel socio de publika utileco, kaj subvencianta ĝin per la sumo de tridek mil kruzejoj jare.

Ĵurnalistoj. Dum la IVa ĵurnalista kongreso okazinta en Recife, la ĵurnalista S-ro Ney Octaviani Bernis prezentis tezon pri la apogo flanke de la brazilaj gazetoj al la XIIIa Brazila Kongreso de Esperanto, kaj ke sekvante la ekzemplon de la ĵurnalista centro de Pernambuco, oni instruu la internacian lingvon en ĉiuj brazilaj ĵurnalistaj centroj. La tezo estis aprobita unuvoĉe.

Italujo

Ministro por Instruado persone malfermas la XXIII-an Italian Nacian Kongreson en Pisa: La histori-riĉa urbo Pisa invitis, pere de loka E.-grupo, la 23-an italian kongreson. Multaj eminentuloj, kaj inter ili parlamentanoj, bonvolis eniri honoran komitaton; multegaj sendis bondezirajn vortojn. La kongreson malfermis **persone** la Ministro por Instruado, Lia

Moŝto Segni, kaj tiu ĉi fakto, unika en historio de la itala movado kaj tre malofta ĉe naciaj kongresoj, donis al la kongreso mem apartan gravecon, efikon kaj sukceson. Ĝi daŭris de la 9-a ĝis la 12-a de Septembro, kaj disvolviĝis en favorega atento de la aŭtoritatoj, de publiko kaj de ĵurnalistoj. Treege helpis al ĝia sukceso la Urbestro de Pisa, kiu riveligis malnova Esperantisto, la universitata Rektoro, la prezidanto de E.N.I.T. (nacia turisma instanco) kiu disponigis riĉegan presaĵaron por ĉiu kongresano; la itala radio dissendis plurajn partojn de paroladoj; gazetaro detale raportis.

Festoj, plaĉaj ekskursoj, interesa literatura vespero fare de Itala Instituto de Esperanto, luksaj oficialaj akceptoj en Pisa kaj en Lucca, brila vespermanĝo en Tirrenia kaj kongresadancvespero gajigis la partoprenantojn. Ankaŭ la laboroj vigle progresis: la estraro de F.E.I. estis unuanime reelektata, kaj el du postenoj, vakaj pro ekŝigoj, estis vokataj s-ro Zumbo kaj adv. grafo Ademaro Barbiellini Amidei. Nenia fuŝa afero (ankaŭ tiu ĉi fakto unika ĉe kongresoj) dank' al atenta organizado de la pisaj geamikoj kaj al lertaj, akurataj zorgoj de la sekretario s-ro Lenzi.

C.C.

Nikaragvo

Kurso. "Dum mia restado en Nikaragvo, en Centra Ameriko, post pluraj prelegoj kaj ĵurnalaj artikoloj

mi ekgvidis kurson de Esperanto en la Asocio de Verkistoj kaj Artistoj de Managua, ĉefurbo de Nikaragvo, kun la partopreno de dudeko da personoj. Unu el la plej fervoraj lernantoj de la kurso estas la 85-jara fama pedagogo S-ino Josefa Toledo de Aguerri, al kiu jam antaŭ dek jaroj estas starigita monumento en unu el la ĉefaj placoj de Managua, kaj kiu en 1950 estis proklamita "La Virino de Ameriko". Sekve de tiu kurso ni fondis la Esperanto-Asocion de Nikaragvo, kies prezidanto estas Prof. Cristino Paguaga Nuñez, kaj la sekretario S-ro Carlos Corea. La sidejo de la nova Asocio estas en la *Domo de la Kulturo*, kaj ĝi jam havas la simpatian de la ĵurnalaro kaj multaj intelektuloj."

Tibor Sekelj.

(S-ro Sekelj estas nomita honora prezidanto de la nova asocio.)

Portugala Esperanto-Asocio

"Vigle laboras nia P.E.A. Ĝiaj gvidantoj, elektitaj de Ĝenerala Kunveno leĝe funkcia, sin donas kore kaj anime al la fortikigo de la PEA-fundamentoj: sin ekrilatas kun la gazetoj, elviŝante de la ĵurnalistaj mensoj araneaĵojn rezultantajn de la abomenindaj tempoj de la malpermeso; preparas sian bibliotekon por baldaŭa prunto de libroj al siaj membroj; ĉiel aktivigas la varbadon de novaj laborelementoj por akiri la necesan minimuman nombron (1000 membroj), kiu permesos la efektivigon de ĝia nacie kaj internacie vasta programo; profitas altrangajn rilatojn por tiri al si klerulojn, kiuj helpu ĝian celon, enirigi nian Esperanton en la Portugalajn elementajn lernejojn.

Tamen, malgraŭ laboro kaj klopodoj, ĝi ne venkos kaj la movado nacia stagnos, se ĉiuj, nepre ĉiuj, kiuj agnoskas nian bonvolon, individue ne prenos sur sin la taskon senrezerve

helpi nin. Milmaniere oni povos nin helpi, skribe, parole, mondonace, eventuale kaj oportune, profitante ĉian momenteton por aldoni, se ne brikon, ereton, al la grava laboro de tiuj, kiuj meritis de nia Esperantista publiko la honoron esti elektitaj.

Ĉiuj povas fidi al nia kriterio. Ni prenos propran sidejon, nur kiam ni povos subteni ĝin; ni eldonos revuon, tuj kiam la budĝeto permesos larĝan vivon; ni propagandos publike kaj larĝskale en tramoj, sur muroj, kinejoj kaj teatroj, nur kiam niaj fortoj kongruos kun tia propagando kaj ni ne povos timi danĝerajn falojn. Ĉiam firme ni piedpremos nian grundon pli kaj pli antaŭen, sed poere. Jen niaj intencoj.

Tio ĉi rilate al niaj samnacionoj. Koncerne niajn alilandajn amikojn, mi, kiu estas maljuna kaj sperta pri propagando, rajtas diri al vi ke la ĉisuprajn vortojn ankaŭ vi povos uzadi efike. Kaj kiel nia P.E.A., malgraŭ la maljuneco de ĝiaj mentoroj, estas infano, kiu bezonas dorlotojn kaj ĝentilaĵojn, mi opinias konvena kaj Esperantisme utila, ke ĉiuj povantoj malavare sendu al ĝi, al ĝiaj biblioteko, kaso, bretoj kaj tirkesto, librojn, monon, folkloraĵojn, poŝtkartojn, glumarkojn, Esperantajn afiŝojn, ĉion kio servos al niaj ekspozicioj kaj kolektoj kaj estas duoblaĵoj en la viaj.

Nun, kiam nia situacio estas ja favora, vi pripensu, geamikoj, kiel ni sangas ankoraŭ pro la malpermeso, kiel al ni necesas kaj meritas viajn amikaĵojn.

Saldanha Carreira.

P.E.A., Calçada Marquês de Abrantes 128-2º, Lisboa, Portugalujo.

(Ni memorigu niajn legantojn pri la informo en la Maja numero, paĝoj 132 kaj 149.)

Post Kvar Ĵaroj

Enketo pri la instruado de Esperanto en Tag-Lernejoj, 1950–1951

EN 1947 U.E.A. kolektis informojn kaj publikigis statistikon en la Jarlibro (2-a parto) pri lernejoj en kiuj oni instruis Esperanton. La termino *lernejo* estas ampleksa, kaj oni enkalkulas ĉiujn tuttempajn edukejojn, de la unuagrada lernejo ĝis la universitato. Oni ricevis detalojn pri 75 diversspecaj lernejoj en 16 landoj.

En 1951 la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (fondita 1949) estis invitita fari similan enketon en kunlaborado kun U.E.A. I.L.E.I. kompilis la liston de nomoj por la enketo, parte laŭ informoj ricevitaĵ de siaj reprezentantoj, parte de la delegitaro faka de U.E.A., parte helpe de diversaj personoj, kiuj interesiĝis pri la afero. U.E.A. presigis la demandarojn kaj dissendis ilin (entute 2500) aŭ grupe al la landaj instruistaj societoj kaj reprezentantoj de I.L.E.I., aŭ individue. La landaj instruistaj societoj mem respondecis pri la disdonado al siaj membroj. I.L.E.I. ricevis la respondojn kaj kompilis la liston, kiu estas presigita en la Jarlibro 1951 (2-a parto).

En 17 landoj oni instruis Esperanton en 131 diversspecaj lernejoj. Aŭstrujo (7), Brazilo (1), Britujo (22), Bulgarujo (1), Danlando (3), Finnlando (2), Francujo (28), Germanujo (23), Grekujo (13), Hungarujo (1), Italujo (2), Jugoslavujo (2), Nederlando (11), Norvegujo (1), Polujo (1), Svedujo (3). Ni ankaŭ ricevis informojn pri Ĉeĥoslovakujo (10), sed ne rekte de la lernejoj mem.

Kun ĝojo ni vidas en la nuna listo landojn, kiuj ne aperis en 1947: Aŭstrujo, Brazilo, Germanujo kaj Jugoslavujo, sed mankas Belgujo,

Nov-Zelando kaj Usono, kiuj kontribuis antaŭe.

Kion ni pensu pri la rezulto? Kompreneble ni ĝojas pri la nombrokresko; tamen ni estas certaj, ke restas lernejoj, pri kiuj ni ne havas informojn. Bedaŭrinde kelkaj instruistoj ne atentis la peton; kelkaj sendube ne ricevis formulojn eble pro la fakto, ke ili estas ekster ia organizita grupo aŭ asocio. Ni konstatas, ke la instruista movado, nun kreskanta, sukcesas akiri pli da kunlaborado. Komparu, ekzemple, la nombron de lernejoj enlistigitaj en 1951 en Britujo, Francujo, Nederlando, kun tiu en 1947. Rigardu la laboron en Germanujo. Ni gratulu Aŭstrujon, kies malgranda instruista grupo faris tute neordinaran klopodon.

Estas evidente, ke la nevenkebla entuziasmo de Esperantistoj kondukas al lerneja laboro, ĉar multaj neprofesiaj instruantoj sukcesas gvidi grupon da lernejoj en lernejo mem, post la oficialaj horoj. Ni notu precipe tiurilate la laboron de D-ro Stamatiadis en Ateno. Alia grava punkto estas la okazigo de kursoj por seminarianoj (estontaj geinstruistoj) en Aŭstrujo, Francujo, Grekujo kaj Nederlando. Bonege estus, se tiuj junaj gekolegoj entreprenus interkorespondadon, kaj ankaŭ interesus sin en la T.J.O.-Kongresoj. Kelkaj universitataj grupoj ankaŭ estas en la listo. Britujo estas elstara, ĉar en la temaro de minimume 10 lernejoj okazas trijaraj kursoj, kaj do Esperanto estas parto de la salajrita laboro de la instruisto.

Ni esperas, ke la listo helpas al interkoniĝo kaj trafa kunlaborado inter lernejoj, sed kompreneble ne

estas ia garantio, ke la studado daŭros en 1952. Ni kulpigas nin, ke ni ne faris tiun demandon ankaŭ. Pluan informon pri lernejoj aferoj, ni kore bonvenigos.

Unu tre interesa propono estas, ke

(Prezidanto I.L.E.I., Komitatano U.E.A.),
183 Woodlands Park Road, Birmingham 30, Anglujo.

Ĉi tiu enketo estas rimarkinda, ĉar ĝi estas la unua fojo, kiam okazis intima kunlaboro inter U.E.A. kaj kunkontraktinta faka asocio por specifa konstrua laboro pri-Esperanta. Jam dum jaroj U.E.A. faris kontraktojn pri kunlaboro por komunaj celoj kun la diversaj fakaj asocioj (nun ekzistas 12 tiaj kontraktoj) kaj la nuna enketo montras kian utilon havas tia praktika kunlaboro.

En la nuna kazo, I.L.E.I. kompreneble havas la plej bonajn rilatojn kun la instruistoj, sed U.E.A. havas la rimedojn kaj eblecojn aranĝi la distribuon de la formuloj kaj diskonigi la rezultojn al la tuta Esperantistaro.

la C.O.

GRAVA AFERO

Por faciligi la diskonadon de la esperantista movado en Mezameriko, la esperantistoj de Gvatemalo aranĝos en Marto 1952, internacian ekspozicion de infandeseĝnaĵoj sub la patronado de la Departamento de Belartoj de la Registaro.

Ĉiuj samideanoj estas petataj helpi al la sukceso de la entrepreno, sendante dekon da desegnaĵoj sub la temo: Kiel la infanoj vidas sian regionon?

Sur ĉiu desegnaĵo indiku: nomaron, adreson, aĝon, lernejan jaron, lernejon.

La sendaĵoj estos reciprokotaj per gvatemalaj infandeseĝnaĵoj, poŝtmarkoj aŭ kafo, laŭ deziro.

Sendu al: Exposición de Dibujos—Departamento de Bellas Artes—Callejón Manchen — Gvatemala-Cd. — America Central.

MUZIKISTOJ !

Certa grupo de serbaj komponistoj kiuj kreadas en nova, originala stilo, bazita sur fundamentoj de popola balkana muziko, deziras konatigi siajn verkojn al eksterlandaj muzikistoj—interpretistoj aŭ eldonistoj. Eventualaj interesontoj povos turni sin al

S-ro Boĵidar Trudiĉ,
komponisto,
Beograd II, Kopernikova 14,
Jugoslavujo

J. Vesterland-Andersen :

Du Sukcesaj Arkeologiaj Tendaroj en Danlando por Esperantistaj Studentoj

POST fondiĝoj de Studenta Esperanto-Klubo en Kopenhago kaj de Esperanto-Federacio de Danaj Altlernejoj en 1949 unu el la plej gravaj taskoj estis kontakti internaciajn organizaĵojn por studentoj kaj altlernejoj. Kaj tute kompreneble ni decidis interrilati kun tiu dana organizaĵo, kiu plej multe sin okupas pri internacia studenta kunlaborado, nome kun Dana Internacia Studentkomitato—*la ekstera ministrejo de danaj studentoj* kiel kopenhaga ĵurnalo nomis tiun komitaton. La komitato tuj ekinteresiĝis pri nia laboro, kaj kunlaboro ekestis.

La unua rezulto estis internacia arkeologia tendaro ĉe vikinga fortikaĵo Aggersborg en Nordjutlando. Tiu tendaro okazis julie 1950—jam la antaŭan jaron DIS aranĝis similajn tendarojn en kiuj la angla lingvo estis la oficiala—kaj oni provis Esperanton.

Kaj la tendaro—neĝusta vorto, ĉar la tendaranoj loĝis kaj manĝis en bona hotelo—sukcesis. 12 gestudentoj el 6 landoj partoprenis, kaj kvankam la nombro de partoprenantoj ne estis tiel alta kiel dezirate—i.a. pro vizaj malfacilaĵoj—DIS estis tute kontenta. Tiu kontenteco estis ege apogata de la aktiva laboro de la partoprenintoj post revenoj al diversaj landoj. Ĉiuj verkis multe pri la tendaro en naciaj gazetoj; ili prelegis pri Danlando kaj kelkaj eĉ prelegis aŭ estis intervjuitaj ĉe diverslandaj radioj. Kaj EFDA kaj SEK kolektis ĉian materialon, kaj poste ni prezentis ĝin al DIS. Do en 1951 denove ebligis aranĝi similan

tendaron. Ni tuj eksentis ke la intereso por la tendaro eksterlande altiĝis. Ni ricevis 30 aliĝojn—sed ni povis akcepti nur 18. Sed denove ni havis vizajn malfacilaĵojn, kaj pro tio nur 13 gestudentoj povis partopreni. Ili venis el Danlando, Finnlando, Germanujo, Nederlando, Norvegujo kaj el Svedujo.

La tendaro ĉi jare okazis en la idilia insulo Bornholm en Baltika Maro. En la urbo Svaneke la partoprenantoj estis enloĝigitaj en privataj hejmoj, kiuj ricevis pagon pro tio. Ĉe Esperantistoj ni ne povis loĝigi la tendaranojn—ĉar en Bornholm (47000 loĝantoj) estas nur unu Esperantisto, kaj li estas komencanto. Dum du semajnoj daŭris la restado en Svaneke, kaj sub gvido de arkeologo ĉe Nacia Muzeo en Kopenhago, d-ro Ole Klindt-Jensen oni elfosis domrestaĵojn el frua ferepoko (4–5 jarcentojn p.K.), kaj oni trovis bone konservitajn domrestaĵojn kaj sufiĉe multajn objektojn.

Sed la tendaro ne havis nur arkeologian flankon—DIS kunhelpita de SEK ankaŭ volis, ke la eksterlandaj gastoj eksciui ion pri dana kulturo. D-ro Klindt-Jensen prelegis pri la historio de Bornholm kaj S-ro Paul Glygaard rakontis pri la prizorgo de blinduloj en Danlando. Krome okazis ekskursoj al ĉiuj gravaj vidindaĵoj de Bornholm.

La urbo Svaneke multe sin interesis pri la tendaro—la urbestro S-ro Emil Andersen ĉiam estis preta helpi, kaj, por ke la partoprenantoj iom ekkonu kiel oni gvidas danan urbon, li

Niaj Kunlaborantoj

Laurids Jakobsen, Ĉefdelegito de U.E.A. en Danlando

INTER la pli “novaj” Ĉefdelegitoj de U.E.A. troviĝas Ing. Laurids Jakobsen, kies tasko estas reprezenti nian asocion en Danlando. Jam de la komenco de sia deĵoro S-ro Jakobsen montris diligenton kaj viglan intereson pri la afero kaj kiel inĝeniero alportis al la procedoj de ĈD sian fakan analizemon, kio rezultigis plibonigojn en la rutinaĵoj.

Naskiĝinte en 1896 en Kvium pr. Hjerm (en la okcidenta parto de Jutlando) S-ro Jakobsen venis kompare malfrue al nia afero, lernante per la Ĉe-metodo en 1934. Lia vigla intereso por Esperanto tamen akiris por li oficojn en la dana movado, kie li funkciis kiel Estrarano de la loka klubo, kasisto de la iama Dana



Esp.-Instituto kaj fine FD kaj ĈD de U.E.A.

Eble la plej notinda okazo en la Esperantista vivo de L. Jakobsen estis lia edziĝo en jan. 1949 kun nederlanda samideanino—vera esperantista unuiĝo—kaj ilian feliĉon jam kompletigis la naskiĝo de filo, Poul Johan, en junio 1951. *M.S.*

daŭrigo de p. 271

invitis la studentojn ĉeesti kunvenon de la urbestro. La tagordo estis tradukita Esperanten, kaj post la kunveno la urbestro regalis la gastojn ĉe gaja festo.

La tendaro invitis la urbanojn al internacia studenta festo. Bonega estis la programo kaj 150 personoj ĉeestis. El la programo ni menciis nur ke la ĥoro ‘Kantantaj Arkeologoj’ kantis kvarvoĉe.

Post Svaneke preskaŭ ĉiuj tendaranoj partoprenis 5-tagan studrestadon en Kopenhago aranĝita de SEK en kunlaboro kun DIS. Kompreneble oni vizitis la plej famajn vidindaĵojn, sed krome estis kultura programo. En la Universitato okazis 2 prelegoj, nome, de S-ro H. V. Rasmussen, kiu prelegis pri la ekonomio de Danlando kaj de S-ro instruisto Poul Thorsen, kies temo estis “Danaj Lernejoj”.

En komunuma biblioteko bibliotekistino F-ino Britta Olsson prelegis pri danaj bibliotekoj. Krome okazis festoj, kaj ekskurso al Sudselando.

Venis la fino. La dua internacia arkeologia tendaro fariĝis sukceso. Tiuj du tendaroj estis vaste subvenciataj de la dana ŝtato. Por ambaŭ tendaroj DIS ricevis entute 12000 Danajn kronojn (ĉ. £600), kaj tial la partoprenantoj pagis nur sumeton (en 1951 27 D.kr. por ĉio, ekskluzive de la restado en Kopenhago). La Dana gazetaro multege skribis pri tiuj du aranĝoj—en la arkivo de SEK troviĝas almenaŭ 250 diversaj artikoloj pri la tendaro en Svaneke. Nun estas ege dezirinde, ke internaciaj studentaj organizaĵoj en aliaj landoj sekvu la ekzemplon de la Dana Internacia Studentkomitato, praktike uzi Esperanton en la internacia studenta laboro.

J. W. Leslie :

La Manĝado kaj la Sano

EN *Esperanto* de aprilo 1949 (p. 53) oni povas legi la konstatojn de Julian Huxley, ke *la plimulto de la fekundaj terpecoj en la mondo fariĝis ĉiam malpli fekundaj* kaj ke, laŭ John Lindberg en siaj konkludoj en la *Raporto de la Ligo de Nacioj pri Nutraĵo, Nutraĵmanko kaj Helpo (1946)* la malpliigo de mondrikoltoj necesigas la likvidon de la brutaro kaj pli vegetaran homan dieton."

Sukeroj : ĉiuj sukeroj, glikozo, ora siropo, melaso, konfitaĵoj, marmeladoj, sukeraĵoj, ĉokoladoj, mielo.

Grasoj : butero, kremo, rensebo, porkograso, lardo, viandaj grasaĵoj, nuksaj oleoj.

La alkalecaj nutraĵoj — la alkalecigaj—kiuj devus formi 75% de la tutaj manĝaĵoj, estas :—

Freŝaj salatoj : el tomatoj, laktuko, celerio, kreso, rafanoj, cepoj, kukumo, raspitaj karotoj, napoj kaj betoj : maldike hakita brasiko, *bruselaj* brasiketoj, spinaco, okzalo, endivio kaj florbrasiko ; garnitaj per mento, salvio, timiano, petroselo, ajlo kaj kreno.

Legomoj (vaporumitaj aŭ kuiritaj en kaserolo) : La ĉi-supraj, kaj krome pastinakoj, asparagoj, fazeoloj, verdaj pizoj, svedaj napoj, terpomoj (vaporumitaj en siaj ŝeloj).

Fruktoj (freŝaj) : **maturaj** dolĉaj pomoj, piroj, oranĝoj, pampelmoj, vinberoj, ananasoj, akvomelonoj, kanariaj bananoj, beroj (krom eksikokoj). Oni devas ne almeti sukeron kaj, kiam eble, oni devas manĝi la ŝelon de fruktoj. Oni devas eviti ĉiujn nematurajn kaj rancajn

fruktojn, aparte prunojn kaj rabarbon. Freŝaj pomoj kaj piroj povas esti kuiritaj (bakitaj en la ŝeloj kaj dolĉigitaj per daktiloj aŭ sekvinberoj). Ankaŭ bananoj povas esti bakataj en la ŝeloj. Oni povas kuiri berojn el ĉiuj specoj, sukerumitaj per mielo aŭ iom da Barbada sukero.

El la sekfruktoj—figoj, sekprunoj, persikoj, abrikotoj, nektarenoj, sekvinberoj, sultanaj sekvinberoj, daktiloj, bananoj—oni povas malsekigi ilin dum 12 ĝis 24 horoj kaj, se oni deziras, boletigi ilin dum 15 minutoj.

Krom la ĉi-supraj manĝaĵoj, nepasturumita lakto, kabana aŭ hejmfarita fromaĝo, selakto kaj migdaloj estas sanigaj nutraĵoj. Oni devus malrapide trinketi la lakton, ĉu varman, ĉu malvarman, sed oni nepre ne boligu ĝin !

Oni devas ne timi pri tiuj konkludoj, ĉar la biologia fakto estas, ke la homa internaĵo efektive estas konstruita ne por manĝadi viandon, sed por konsumi vegetaĵojn.*

Ni do konsideru la manĝadon, kiel rimedon por la akiro kaj konservo de la sano

Iu diris, ke *ni estas tio, kion ni manĝadas*, kaj tio estas vera aserto, kiun oni devus ne forgesi. La korpo bezonas por sia ĝusta ĉelo-nutro preskaŭ ĉiujn elementojn, troveblajn en la naturo : oksigenon, hidrogenon,

* La viandmanĝaj bestoj havas mal-longajn intestojn, sed la homoj havas longajn intestojn kaj cetere ne posedas la koncernajn dentojn (la segdentojn) por la ĝusta manĝado de viando, kiel havas, ekzemple, hundoj, leonoj, kaj aliaj viandmanĝuloj.

nitrogenon, karbonon, kalcion, natrion, magnezion, feron, kalion, jodon, sulfuron, k.t.p. kaj oni povas akiri tiujn laŭ la ekzaktaj kvantoj nur se oni manĝadas la naturajn nutraĵojn, sed tute ne per medikamentaj fortigaĵoj, piloloj, drogoj, patentaj nutraĵoj k.s.

Oni povas enklasigi la nutraĵojn laŭ la substancoj, kiujn ili enhavas kaj laŭ la funkcioj kiujn ili plenumas, jene :—

1. **Proteinoj** : enhavas karbonon, oksigenon, hidrogenon kaj nitrogenon, kaj ili estas necesaj por la kreskado kaj rekonstruado de la muskola histo.
2. **Karbohidratoj** (ameloj kaj sukeroj) : enhavas karbonon, oksigenon kaj hidrogenon kaj ili servas kiel hejtaĵo por provizi energion.
3. **Grasoj** : enhavas la samajn elementojn, kiajn karbohidratoj, sed laŭ aliaj proporcioj, kaj ili servas kiel hejtaĵo por provizi varmon.
4. **Mineralaj saloj** : kalcio, natrio, magnezio, fero, kalio, jodo, fluoro k.t.p. estas esencaj por ĉiu grava procedo de la korpo.
5. **Vitamenoj**† : A, B, C, D k.s. kiuj estas grave esencaj por la sano.
6. **Akvo** : kiu enhavas oksigenon kaj hidrogenon, estas esenca por ĉiu procedo de la vivo.

Post digesto ĉiu manĝaĵo postlasas rekrementon, kiu povas esti aŭ acida, aŭ alkaleca. Ekzemple, la proteinoj kaj karbohidratoj postlasas acidecajn rekrementojn—urinacidon kaj karbonacidan gason respektive—dum freŝaj fruktoj kaj legomoj normale postlasas alkalecan rekrementon pro la fakto, ke ili enhavas iom grandajn

kvantojn de alkalecaj mineralaj saloj —kalcio, natrio, magnezio, kalio, fero kaj mangano.

La graveco de racia manĝado kuŝas en tio, ke estas esence por la ĝustaj ĉelnutrado kaj eliminado, ke la sango restu iomete alkaleca, sed neniam acida ; t.e. ĉiam devas esti **alkaleca rezervo** por neŭtrigi ĉiujn acidojn, kiuj produktiĝas en la histoj. Se la sango ne povas akiri tiujn alkalecajn salojn el la ĉiutaga manĝaĵo, ĝi elprenas ilin el la histoj. Ekzemple, ĝi forrabas el la dentoj iom de ilia kalcio, kun la neevitebla rezulto — putrantaj dentoj, tre ĝenerala fenomeno en la nuntempa mondo !

La acidformaj nutraĵoj plejparte estas densigitaj, dum la alkaliformaj konsistas plejparte el akvo kaj la mineralaj saloj, kiuj ekzistas en tute malgrandaj kvantoj en eĉ la plej bonaj manĝaĵoj. Estas memevidente, ke oni devas manĝadi la alkaliformajn nutraĵojn en multe pli grandaj kvantoj ol la acidformajn specojn, kaj sekura proporcio estas : tri partoj el la unuaj kun unu parto de la lastaj.

La plimulto de la homoj nuntempe manĝadas grandajn kvantojn de la densigitaj nutraĵoj kaj tre ŝpareme de la fruktoj kaj legomoj. Ĉu estas surprize, ke la malsano kaj la malbonfarto floradas ?

Oni devas diferencigi inter la vivaj kaj senvivigitaj nutraĵoj. Ĉiuj nutraĵoj, en sia natura, tuteca stato, enhavas mineralajn salojn, ĉu en granda, ĉu en malgranda kvanto. La civilizo tamen provadis plibonigi la naturajn nutraĵojn per la rafinado. Sukero, faruno, rizo—jen nur tri, de kiuj oni forrabis iliajn esencajn mineralajn salojn kaj vitamenojn, rezulte de la klopodoj de la

† Serio de substancoj ĉeestaj en naturaj nutraĵoj.

produktistoj, fari ilin blankaj kaj *puraj* (!) Tiaj blankaj nutraĵoj estas senvivigitaj, mortintaj ; oni ne povas kompari ilin kun la tutecaj, vivoplenaj, vivantaj nutraĵoj, kiel ekzemple tutgria faruno, nepolurita rizo kaj nerafinita sukero.

La ĉefaj senvivigitaj manĝaĵoj, kiujn oni prefere evitu entute, estas rafinita blanka faruno, kaj pano, grenaĵoj, kukoj, pudingo, pastaĵoj, kaj biskvitoj faritaj el ĝi ; grenfaruno, flarpulvoro, polurita rizo, tapioko, makaronio k.t.p. kaj rafinita blanka sukero kaj sukeraĵoj, ĉokoladoj, konfitaĵoj, marmeladoj, *ora* siropo, glikozo, limonadaĵoj kristaloj.

La vivantaj manĝaĵoj, kiujn oni devus manĝadi anstataŭ la ĉi-supraj senvivaj specoj, estas tutgrena faruno, kaj pano, grenaĵoj, kukoj, pudingo, kaj biskvitoj faritaj el ĝi ; kaj sekala kaj tritika krispopanoj, nepolurita rizo, bruna tapioko, bruna makaronio k.s. kaj Barbada aŭ Demarara sukero kaj ĝiaj produktaĵoj, kun mielo, nigra siropo, freŝaj kaj sekigitaj fruktoj.

La densigitaj acidformaj nutraĵoj, kiuj devus esti nur 15% el la tuto, kiun oni manĝas, estas :

Proteinoj : ĉiuj viandoj, ĉasaĵoj, kortbirdoj, fiŝoj, ovo, fromaĝo, nuksoj, faboj, lentoj, viandekstraktaĵoj, k.s.

Ameloj : ĉiuj panoj, biskvitoj, kukoj, pudingo, avengrio, rizo, tapioko, makaronio, grenfarunaĵo k.s.

Sukeroj : ĉiuj sukeroj, glikozo, *ora* siropo, melaso, konfitaĵoj, marmeladoj, sukeraĵoj, ĉokoladoj, mielo.

Grasoj : butero, kremo, rensebo, porkgraso, lardo, viandaj grasaĵoj, nuksaj oleoj.

La alkalecaj nutraĵoj — la alkalecigaj—kiuj devus formi 75% de la tutaj manĝaĵoj, estas :—

Freŝaj salatoj : el tomatoj, laktuko, celerio, kreso, rafanoj, cepoj, kukumo, raspitaj karotoj, napoj kaj betoj : maldike hakita brasiko, *bruselaj* brasiketoj, spinaco, okzalo, endivio kaj florbrasiko ; garnitaj per mento, salvio, timiano, petroselo, ajlo kaj kreno.

Legomoj (vaporumitaj aŭ kuiritaj en kaserolo) : La ĉi-supraj, kaj krome pastinako, asparago, fazeolo, verdaj pizoj, svedaj napoj, terpomoj (vaporumitaj en siaj ŝeloj).

Fruktoj (freŝaj) : **maturaj** dolĉaj pomoj, piroj, orangoj, pampelmoj, vinberoj, ananasoj, akvomelonoj, kanariaj bananoj, beroj (krom eksikokoj). Oni devas ne almeti sukeron kaj, kiam eble, oni devas manĝi la ŝelon de fruktoj. Oni devas eviti ĉiujn nematurajn kaj rancajn fruktojn, aparte prunojn kaj rabarbon. Freŝaj pomoj kaj piroj povas esti kuiritaj (bakitaj en la ŝeloj kaj dolĉigitaj per daktiloj aŭ sekvinberoj). Ankaŭ bananoj povas esti bakitaj en la ŝeloj. Oni povas kuiri berojn el ĉiuj specoj, sukerumitaj per mielo aŭ iom da Barbada sukero.

El la sekfruktoj—figoj, sekprunoj, persikoj, abrikotoj, nektarenoj, sekvinberoj, sultanaj sekvinberoj, daktiloj, bananoj—oni povas malsekigi ilin dum 12 ĝis 24 horoj kaj, se oni deziras, boletigi ilin dum 15 minutoj.

Krom la ĉi-supraj manĝaĵoj, nepasturumita lakto, kabana aŭ hejmfarita fromaĝo, selakto kaj migdaloj estas sanigaj nutraĵoj. Oni devus malrapide trinketi la lakton, ĉu varman, ĉu malvarman, sed oni nepre ne boligu ĝin !



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

* = akireblaj ĉe U.E.A.

***Bagatelaro** de Johan Hammond Rosbach, eld. Esperantoforlaget A/S, Oslo, 19×13cm., 174 p., broŝ., prezo 7ŝ. 6p., afranko 6p.

El Oslo, la urbo de la venonta U.K., venas, kvazaŭ bona aŭguro, originala verko tre atentinda. Ĝi konsistas el dek kvin pecoj—laŭplaĉe nomu ilin historietoj aŭ noveloj—kiuj kontentigos la leganton, ne tiom pro lerta konstruo, kiom pro tio, ke verŝajne la verkinto prenis sian krudan materialon pli el la propra travivaĵo, ol el la fantazio. Tio estas aparte sentebla en la plej longa novelo *Mozaiko*, en kiu kunvojaĝantoj en vagonara kupeo rakontas laŭvice historion el sia vivo. Aldone troviĝas ses amuzaj versaroj, verkitaj iom laŭ la maniero Schwartz. La aŭtoro averte skribas, ke li ĉefe celas la samideanojn, kiuj ne plu estas puraj komencantoj, sed li certe ĉefe trafos legantaron, kiu jam ŝatas la originalan literaturon. Tio ne signifas, ke la verko ne taŭgas por la originala celo. Pro tio, ke la lingvo estas klara kaj flua, la libro utilos por anoj de kompletiga kurso—nur unu versaron la gvidanto trovos konsilinde preterpasi. Tuj en la komenco la aŭtoro listigas vortojn maloftajn—ekzemplo imitinda en verkoj samcelaj. La libro venas el la eldonejo, el kiu venis la utila *La Esperanta Movado*. Bedaŭrinde preseraroj denove enŝteliĝis, tamen ili estas malmultaj kaj la libro estas klare presita kaj de plaĉa aspekto. Espereble ĉi tiu verko ricevos tian akcepton, ke s-ro Rosbach sentos sin devigata denove fari

kontribuon al nia originale verkita literaturo.

C. D. A. Capp.

Iom pri Stokholmo. 18×12.5cm. 40 p., ilustr., eld. Sveda Laborista Asocio (Barnhusgatan 8, ö.g. n.b., Stockholm) okaze de la 24-a SAT Kongreso. Prezo : sved. kr. 1.50.

Ne ordinara gvidlibro, sed vigla, viva priskribo de la sveda ĉefurbo, teksto facile legebla, agrabla. Kiu deziras konatiĝi kun la “Reĝino de la Orienta Maro” trovos en tiu ĉi konciza priskribo multe da materialo. Bona preso kaj glata papero. H.J.

Staline, la linguistique et l'impérialisme russe de Prof. Lucien Laurat. 21×14cm. 92 p. Editions “Les Iles d'or”, Paris. Prezo : 120 fr. fr.

Pasintjare trakuris la gazetaron informo ke la lingvoteorio de Marr (jafetida grupo da lingvoj, nomata laŭ la tria filo de Noa, Jafet, prapatro de la medoj, armenoj, grekoj, keltoj, germanoj kaj slavoj), estis malaprobata de Stalin kaj kun ĝi ankaŭ la dependo de la lingva evoluo de la historia materialismo. En la aro da sin kontraŭantaj informoj pri tiu ĉi juĝo de Stalin, la broŝuro de eminenta scienculo kaj socialisto metas la necesan lumon kaj estus dezirinde ke tiu ĉi zorge kompilita verko estu tradukota en Esperanto. Franc-lingvanoj kaj samideanoj sciantaj la francan nepre profitos de la legado de tiu ĉi broŝuro, pri kiu ni ankoraŭ revenos en detala artikolo. H.J.

Esperanto — Lehrbuch für Fortgeschrittene (Esperanto por progresintoj): G. Streidt; eld. S. Ziegler Verlag, München-Pasing, Germ.; 21×15cm., 78 p. broŝ., prezo nemontrita.

Ĉi tiu estas bona verko. Oni povas trovi multajn lernolibrojn por komencantoj, sed estas malpli facile trovi lernolibron por progresintaj studentoj. Jen la plano de la verko: Elĉerpaĵoj por lego kaj traduko; demandoj, kiujn oni tradukas kaj respondas por konversacia ekzercado; lingva studo enhavanta rimarkojn pri prononco, vortkunmeto k.t.p.; ekzercoj pri ĉiuj punktoj.

La elĉerpaĵoj estas bone elektitaj, interesaj, kaj kelkaj traktas pri la historio de Esperanto aŭ temoj rilataj al la lingvo, ekz-e: pri bona stilo, la vizito de *D-ro Esperanto* al Dresdeno k.t.p. Iuj estas ĉerpitaj el konataj Esperantaj verkoj—*Pro Iŝtar*, *La Karavano* (Hauff).

La konversacia parto estas zorge planita kaj plene provas la studenton.

Lingvaj problemoj estas klare diskutitaj kaj detale klarigitaj. La verkisto konsilas precizan tradukon. Li traktas krome pri la deveno de multaj Esperantaj vortoj.

La nivelo de la ekzercoj estas alta kaj tute taŭga por progresinto. En la lastaj paĝoj ni trovas kelkajn proverbojn kaj tradukojn de germanaj idiotismoj.

Ĉi tiu estas vere admirinda verko, kvankam ĝi ne taŭgas por meminstruado. Instruisto estas necesa por fari kontrolon de la faritaj taskoj. Ŝajnas al mi, ke ĉi tia verko estus utila se ĝi ekzistus en Esperanto, sed ne nur en la germana lingvo.

R.M.D.

S.A.T. Jarlibro 1950–1951. 14.5×10.5cm. 144 p. (kun mondkarto de SAT sektoroj—horzonoj)—eld. Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, Paris 20. (Nur por membroj, neaĉetebla).

La nova jarlibro de SAT enhavas krom la kutimaj adresoj de la membraro, la statuton kaj aron da organizaj dokumentoj, regularoj pri la funkciado de la Asocio kaj aliaj utilaj informoj. Bona preso, bona papero.

H.J.

Dio, nia centro kaj nia deveno: H. T. Hamblin: Eld Pensologia Eldonejo, 17 Abbots Road, Birmingham 14, Angllando. Prezo 1 ŝil.

La vojo al daŭra paco kaj ĝenerala prospero: Nova Esperantlingva faldfolio kun la deklaro de principo kaj politiko de la Sepa Internacia Kongreso por Progresigo de Tervalora Impostado kaj Libera Komerco (International Union for Land Value Taxation and Free Trade, 4 Great Smith Street, London, S.W.1). La organo de tiu organizaĵo *Land & Liberty* en siaj numeroj marto kaj aprilo enhavis raportojn pri la propaganda valoro de Esperanto kaj mencion pri rezultoj sekvintaj la uzon de tiu lingvo; krome la tradukon de Esperanta teksto elsendita de Radio Roma.

Ricevitaj: (petante, skribu nur Esperante).

Thiers (Francujo): 24-paĝa ilustrita faldfolio franclingva, kun 2-paĝa teksto Esperantlingva. Aperis laŭ iniciato de la loka grupo. Petu de: Syndicat d'Initiatives, THIERS (Puy-de-Dome) Francujo.

Bonn (Germanujo): Germanlingva faldfolio, kun urboplano, kun aldonita folio du-paĝa Esperantlingva. Sendu 1 respondkuponon kaj petu de: Verkehrsamt Bonn, Poststrasse 27/29, BONN, Germanujo.

Por via distro



Sendu vian plej amuzan anekdoton al M. Otiel, ĉe U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo. Antaŭdankon

Difinoj

Ordigi dokumentojn en klasigilon : rimedo ilin malaperigi kun metodo.

* * *

Ŝuldo : la sola afero kiu ne malgrandiĝas de la fakto, ho ve, esti kontraktita.

* * *

Edzo : estaĵo je kio fraŭlino aspiras post kiam ŝi ĉesis serĉi idealan viron.

* * *

Konvinko : tiu eraro kiun homoj akceptis dum juneco kaj kiun ili en maljun-aĝo ne volas plu korekti pro falsa honto aŭ spitemo.

Inter geedzoj

Edzino : Ĉu ne estis mi, kiu alportis la tutan havon de ĉi tiu hejmo? Kion vi havis antaŭ nia geedziĝo?

Edzo : Pacon, mia kara !

Elektio

La patrino tre koleras ĉar Karlo ne volas manĝi la kaĉon. Ŝi forte riproĉas lin, sed la patro interrompas ŝin :

Patro : Kial vi tiel riproĉas lin? Lasu al la infano elekti.

Patrino : Do, vi mem manĝigu lin !

Patro : En ordo. Venu fileto mia kaj manĝu vian kaĉon. Aŭ ĉu vi preferas vangofrapon ?

Kio estas via V.-K. ?

Kompilas S-ro A. S. Beuker, Nov-Zelando.

Divenu la ĝustajn en la signifoj ĉe la sekvantaj vortoj. Se vi ĝuste elektas ĉiujn, via Vort-Kvociendo estas 100. Tamen deprenu 10 por ĉiu miselekto aŭ nescio.

Respondoj sur p. 280)

1. **Porcio** : (a) monero, (b) kvanto da manĝaĵo, (c) io malgrandega ?
2. **Psiko** : (a) aperaĵo, (b) misteraĵo, (c) tuto de spiritaj fortoj ?
3. **Serafo** : (a) glaseto, (b) servutulo, (c) plej altranga anĝelo ?
4. **Berilo** : (a) juvelŝtono, (b) besto, (c) vegetaĵo ?
5. **Cidro** : (a) brulrestaĵo, (b) pomvino, (c) insekto ?
6. **Piedestalo** : (a) religia doktrino, (b) izola bazo de statuo, (c) kartludo ?
7. **Soneto** : (a) versaĵo el 14 versoj, (b) muzikverko, (c) muzik-instrumento ?
8. **Doko** : (a) kuracisto, (b) dekduo, (c) havena baseno ?
9. **Burleska** : (a) ĉiutageca, (b) komika laŭ stranga maniero, (c) perdinta la prudenton ?
10. **Evento** : (a) senduba fakto, (b) elasta substanco, (c) elstara okazaĵo ?

Valora Eksperimento

LA Internacia Amikeca Ligo estas, ĝis nun, la sola "Apoganta Asocio" de U.E.A. (vidu paĝon 72 de la jarlibro). Fondita en 1931 por krei spiriton de amikeco inter la popoloj de la mondo, ĝi ĉiam havis amikajn rilatojn kun nia movado.

Ĝi faras sian amikecan laboron plejparte per la aranĝo de malmultekostaj libertempoj kaj ferioj en diversaj landoj, sed ankaŭ per kunvenoj de lokaj grupoj kaj alimaniere. Ĝi plej ofte uzas la anglan lingvon en la diversaj libertempejoj, sed en la lastaj jaroj evidentiĝis, ke tiu ne ĉiam forigis la lingvan problemon !

Nun tiu Ligo volas fari eksperimenton. Ĝi deziras eltrovi ĉu en la daŭro de iom malpli ol unu jaro ordinara persono povas sufiĉe bone lerni Esperanton por praktike utiligi sian scion en tia libertempa centro. Ĝi decidis aranĝi, kiel provon, unu el siaj libertempaj centroj en 1952 kun Esperanto kiel la oficiala lingvo, kaj por ke tiuj kiuj partoprenos la aranĝon havu la maksimuman utilon, ĝi elektis sian centron en Oslo. Tiu Esperantlingva centro funkcios dum du semajnoj de 26a de Julio 1952, kaj sekve la dua semajno koincidos kun la 37a U.K.

La speciala celo de I.A.L. estas eltrovi ĉu oni povas sufiĉe rapide lerni Esperanton, kaj se la rezulto estos kontentiga, povos esti ke ĝi multe pli utiligos Esperanton por estontaj aranĝoj. Sekve ĝi, kune kun U.E.A., aranĝis konkurson en kiu estos kelkaj premioj, ĉiu po £10, por helpi al la elspezoj de la vojaĝo al Oslo. La kondiĉoj por tiu konkurso estas simplaj :

1. La konkurso validas por ĉiuj landoj, kaj ĉiu, kiu plenumas la kondiĉojn, rajtas partopreni ĝin, ĉu membro de I.A.L. aŭ ne.

2. Konkursanto ne devas esti pli ol 30-jaraĝa je 2 Aŭg. 1952. Li (aŭ ŝi) devos havigi subskribitan deklaron de sia Esperanto-instruisto, aŭ UEA-delegito, aŭ IAL-oficisto, ke li ne komencis serioze studi la lingvon antaŭ Julio 1951.

3. Li devas sendi tiun deklaron al UEA en Rickmansworth antaŭ la 1-a de Marto 1952 kaj peti ekzamenpaperon. Ju pli frue des pli bone !

4. Ĉiu provo devos atingi la Centran Oficejon de U.E.A. antaŭ la 10-a de Majo. Ĝi estos mallonga originala verkaĵo en Esperanto, kun akompana certigo de la instruisto aŭ alia taŭga persono, ke la lernanto ŝajne estos kapabla ĝis Aŭgusto kompreni kaj komprenigi sin per parolata Esperanto.

5. Oni informos gajnintojn letere aŭ telegrame antaŭ la 31-a de Majo, sed se pro iu kaŭzo gajninto ne povos ĉeesti la centron, UEA rezervas al si la rajton transdoni la premion al alia konkursanto.

* * *

Ne-gajnintoj povos ĉeesti la centron se ili pagos la ordinaran koston : £9 por la du semajnoj por gastado kaj manĝaĵoj plus proksimume £3 por ekskursoj, kaj plus, kompreneble, la veturkoston de la hejmo. Ne-konkursantoj povos partopreni je la sama kosto, sed se estos tro da petoj por lokoj ne-rezervitaj por konkursantoj oni donos preferon al membroj de I.A.L.

Jen la plano en nuksoŝelo. Evidentiĝas, ke por sukcesigi ĝin

devos ĉeesti sufiĉe da novaj lernantoj, kaj krome, estos bone ke ĉeestu kelkaj pli spertaj Esperantistoj por helpi al ili. La Esperantistoj en Oslo jam kunlaboras kun la IAL-sekcio tie. Restas al la Esperantistoj en aliaj landoj fari sian kontribuon. Ili kontaktigu kun I.A.L. en siaj landoj por proponi sian helpon. Tiucele jen kelkaj utilaj adresoj :

Aŭstrujo : IFL, Postamt 71, Postfach 63, Wien IX.

Belgujo : F-ino L. Cokelbergh, IFL, Boîte Postale 151, Bruxelles.

Britujo : IFL, 3 Cromwell Road, London, S.W.7.

Danujo : S-ro H. Askegaard, Trekronengade 13, Valby, København.

Finnlando : IFL, Poste Restante, Helsinki, Huvudpostkontor.

Francujo : IFL, 48 Rue d'Hauteville, Paris X.

Germanujo : S-ro H. H. Westerwelle, Papiermühle 14, (22a) Solingen.

Irlando : F-ino M. Gaynor, 117 Home Farm Road, Glasnevin, Dublin.

Italujo : D-ro U. Scalfi, Via Menabrea 25, Milano.

Nederlando : IFL, Javastraat 8, Den Haag.

Norvegujo : F-ino T. Weltzin, Helgesangsgt. 76b, Oslo.

Svedlando : D-ro B. Lundberg, Vulcanusgatan 4, Stockholm.

Svislando : S-ro P. Krähenbühl, Hotel Helvetie, Montreux.

Kio estas via V.-K.?

Respondoj (vidu p. 278)

1. (b) **Porcio** estas kvanto da manĝaĵo.
2. (c) **Psiko** estas la tuto de spiritaĵ fortoj, konsciaj kaj nekonsciaj.
3. (c) **Serafo** estas plej altranga anĝelo.
4. (a) **Berilo** estas juvelŝtono kun koloro de marakvo.
5. (b) **Cidro** estas pomvino.
6. (b) **Piedestalo** estas izola bazo de statuo.
7. (a) **Soneto** estas versaĵo konsistanta el 14 versoj.
8. (c) **Doko** estas havena baseno.
9. (b) **Burleska** signifas komika laŭ stranga maniero.
10. (c) **Evento** estas elstara okazaĵo.

LA TEMPO RAPIDE ELCERPIĜAS ! *

La Esperantistoj kiuj jam legis la romanon, INVITO AL ĈIELO, estas avertitaj pri la baldaŭ alvenontaj teroroj surtere. Eĉ la malmultaj cinikemuloj, kiuj nun mondsaĝe ridetas malkrede pri la averto, spite de la konfirmegaj okazaĵoj nuntempe skuantaj la naciojn kredos post 1954, sed tro malfrue !

Veraj Zamenhofanoj amas siajn kunhomojn ; tolere kompatas tiujn kiuj submetiĝas al blindiga malamo pro malica misinformo ; volas ke la disigita, multe trompita homaro atingu unuiĝon en libero, prospero kaj senfina feliĉo en tuthomara gefrataro ; volas plenumi siajn devojn en la diligenta, senĉesa semado de nia kara Lingvo kaj de homaranismo por la estiĝonta Nova Mondo.

INVITO AL ĈIELO ne pretendas esti voĉo de oraklo, sed la nunaj okazaĵoj en la videbla, teruriga marŝado al Harmegido pli kaj pli klare konfirmas la taŭgecon de la avertoj en la libro. Leĝu kaj relegu ĝin, kaj post kelkaj jaroj travivante Harmegidon, vi dankeme rikoltos vian rekompencon (INVITO AL ĈIELO baldaŭ aperos finnlingve kaj anglalingve ! Kial ne en aliaj lingvoj naciaj ?)

Mendu per via nacia libroservo, aŭ senpere de la eldonejo :

Siegfried Ziegler Verlag,

**München-Pasing, Engelbertstr. 7,
Germanujo**

Prezo : Bind. DM 4.50, broŝ. DM 3.—
aŭ ĉe U.E.A., Rickmansworth
Bind. 8 ŝil., afr. 6p.

* Ĉi tiu anonco estas skribita kaj pagita de la aŭtoro pro sincera deziro servi la bonan celon de homamismo.

Enigma Konkurso N-ro 62


Solvojn sendu al S-ro P. H. Mooy, rue Stuyvenbergh 28, Brussel II, Belgujo.

Solvo de enigmo N-ro 132. Sur la fenestro de belecsalono oni povis legi :
“Ne fajfu al la ino, kiu foriras el ĉi tiu salono, povus esti via avino.”

Enigmo N-ro 136. 3 Krucvort-enigmoj. Por solvi ĉi tiun enigmon, desegnu tri figurojn, kiel la ekzemplo. La 3 klarigoj post ĉiu numero prezentas 3 vortojn (1 por ĉiu figuro). La sinsekvo de la klarigoj estas arbitra, do se ekzemple la 3 vortoj post H.4 apartenas al la figuroj 1, 2 kaj 3, povas esti, ke la 3 vortoj post H.7 apartenas al 3, 1 kaj 2. Vi do mem fiksus, kiuj vortoj apartenas al la sama figuro. Jen la klarigoj :

Horizontale : 1. prepozicio-ĉerizbrando-promenejo (tri 5-literaj vortoj) + orda numeralo-prepozicio-haŭtŝvelaĵo (tri 4-literaj vortoj). 3. nutraĵo speciale azia-herbaĉo-povante okazi. 4. efektive ekzistanta-dispecetigipulvorigi per batoj. 5. en tute taŭga maniero-arkitektura ornamaĵo-havi odoron. 6. ĉefarterio-brue elspirdumfestena parolado. 7. meblo-konstanta-apartigi. 8. birdo el klaso de grimpuloj - rabobirdo - demanda adverbo. 10. grasa fluaĵo-tersurfaco-pensaĵo + ŝipŝarĝo-almeti ion por ornami-ŝtopilo.

Vertikale : 1. fari ion el nenio-trueto-rabobirdo + akiri per monomalsevera-pulmomalsano. 3. laŭtegemultfoje-malsame. 4. simbolo de honoro-kaŝa kaj sekreta-definitive nuligi leĝon. 5. pordiserva ornamofişovoj-nutraĵo. 6. ĉefpersono en rakonto-juvela ŝtono skulptita-malhela koloro. 7. organika fluaĵonekurba-tutcerta. 8. koloro-senfleksia pronomo-lerte trompe. 10. valorpapero-diboĉo-ĉiela nutraĵo + bleki-serpento-speco de violono.



Enigmo N-ro 137. La ĉi subaj klarigoj prezentas post ĉiu numero 2 vortojn, el kiuj la duan oni trovos, simple metante 1 literon antaŭ aŭ inter la literojn de la 1-a vorto. La novaj literoj formas en la donita sinsekvo proverbon el la proverbaro de D-ro Zamenhof. Jen la klarigoj : 1. moviĝi-superi. 2. konifero-pensmaniero. 3. senpeza-senfina. 4. astro-ĉerpilo. 5. korpoparto-vivnecesaĵo. 6. utila planto-tropika planto. 7. deziro-epidemia malsano. 8. spacomilitistaro. 9. metalo-diablo. 10. estro-titolo. 11. ekbatalo-kankro. 12. duoblaĵo-parenco. 13. malpuraĵo-sentegmenta spaco. 14. frapo-barko. 15. volbita-senvegetaĵa. 16. korp parto-hejtaĵo. 17. gramatika formokialo. 18. riverfiŝo-birdego. 19. rema militŝipo-domparto. 20. dombirdo-linaco. 21. kartonaĵo-intervalo. 22. interkomunikilo - valorunuo. 23. restigi-spasme elspiri. 24. grandega kvanto-monunuo. 25. klopodo-ŝakfiguro.

Ensendis S-ro G. Englert (Germ.)

Esperantista Vivo

Naskiĝoj

Burgman. Al Ges. G. J. Burgman (Pieter Aertszstraat 83 hs, Amsterdam Z, Nederlando) filino Henny, je 9 oktobro 1951.

Verdier. Al Ges. Verdier (78 Av. Marie-José, Bruxelles, Belgujo) filino Dominique, je 8 septembro 1951.

Geedziĝoj

Galjuf-Kiridžija. F-ino Jelena Galjuf, el Kupari, kaj S-ro Ante Kiridžija, D de UEA en Dubrovnik, Jugoslavujo, je 26 septembro 1951.

Munkelt-Smith. La 8-an de septembro en Hamburg, Helga Munkelt, Germanino, kaj Norman R. Smith, Anglo, sekretario de la Londona Esperanto-Klubo. Ili nun loĝas ĉe 23 Cranbourne Road, London, N.10. Esperanto estos la sola hejma lingvo.

Al ĉiuj ni esprimas nian sinceran gratulon.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—Red.

Ahlström, S-ro J. M., D. de UEA en Halmstad, Svedujo, je 31 aŭgusto 1951, 54-jara.

Aymonier, Prof. Camille, en Parizo, Francujo, je 14 septembro 1951, 84-jara. Antaŭe Akademiano, li estis unu el la plej bone konataj Esperantistoj en Francujo.

Baillie, S-ro T. C., en Worksop, Anglujo, je 13 julio 1951. Membro-subtenanto de UEA dum multaj jaroj.

Hulme, S-ro A. J. Howard, D. de UEA en Ovingdean, Anglujo, je 28 septembro, 82-jara. Dumviva membro de UEA. Konata Egiptologo.

Klau, S-ro Gerhard, VD de UEA en Berlin, Germanujo, je 18 septembro 1951. Estrarano de Esp.-Ligo Berlin kaj malnova Esperantisto.

Sumfield, S-ino, la edzino de nia D. en Eastbourne, Anglujo, je 27 aŭgusto 1951, post longa malsano.

Torres-Carreras, D-ro Ramon, en Barcelona, je 4 septembro 1951, 72-jara. Fervora kataluna membro de UEA, kiu daŭre batalis por Esperanto.



Malgraŭ la modernaj eltrovoj de la tekniko la homoj ankoraŭ kaj ĉiam sentas la junaĝan sorĉon de la trajno, preterbruenta kaj fajfanta kun longa blanka fumstrio ŝvebanta super la trako.

Freeman Wills Crofts, mondfama verkisto kaj samideano, kondukas nin en la kulisojn de la fervoja administrado kaj konigas al ni amason da interesaj faktoj, kiuj pligrandigos nian ĝuon je venontaj trajnvojaĝoj. Tio estas la fono de la streĉa romano pri spionoj kaj sabotado kaj la taskoj de *Scotland Yard* en dummilita Britujo.

Lerte tradukita de
Mason Stuttard

MORTO DE TRAJNO

de Freeman Wills Crofts

devus nepre troviĝi sur via
librobreto.

256 paĝoj, bindita
Prezo 9 ŝil., afranko 6p.

Eldonita de

The Esperanto Publishing Co. Ltd.

Mendu ĉe

Universala Esperanto-Asocio

Heronsgate, Rickmansworth,

Anglujo

aŭ ĉe enlanda libroservo

F. Omelka

Nia felietono

La Alaska Stafeto

La lupoj momenton ŝanceliĝis. Sed nur momenton. Ilia superforto estis tro granda. Malgraŭ tio, ke la hundoj batalis kun admirinda kuraĝo, tamen ilia nombro malpligrandiĝis.

Subite la plej granda lupo ĵetis sin sur Fulmon. Kasson ekvidis tion. Li alsaltis al la atakanto kaj volis doni al ĝi mortigan baton.

La lupo liberlasis Fulmon; ĝi rapide flankiĝis kaj ekmordegis la pafilon, kiu trafis la malmolan glacieron. Per forta tirego ĝi elmanigis al Kasson la pafilon kaj forkuris kun ĝi kelkajn paŝojn, kie ĝi komencis bategi per ĝi.

Kasson forsaltis al la sledo. Li serĉis objekton, per kiu li povos defendi sin. Sed krom la paketo kun sero kaj kelkaj kovriloj la sledo estis malplena . . .

Li rapide demetis la kovrilojn kaj levis la pezan sledon alten. Li svingos per ĝi kaj defendos sin ĝis la lasta spiro.

La hundoj jam komencis retiriĝi. Ili kuris al sia sinjoro, kvazaŭ ili serĉus ĉe li defendon.

IX. En la lasta momento

Tiun tagon vivis Nome kvazaŭ en febro.

Ĉiumomente elkuradis homoj el siaj domoj por rigardi, ĉu la savo jam alproksimiĝas. La poŝtoŝtacio estis superŝutata per telegrafaj demandoj el ĉiuj partoj de la mondo: “Ĉu Gunnard Kasson jam alvenis?”

Kaj ĉiam la sama frostiga respondo:

“Li ankoraŭ ne alvenis.”

Dum la tago pasis, kreskis la ekscito, ĉar la epidemio ne malfortiĝis. Doktoro Welch ne havis sufiĉe da tempo por desinfekti la injektilon kaj plenigi ĝin per la sero, kiu montriĝis tiel neefika

Li povis eniri kiun ajn domon; ĉie li aŭdis la saman parolon, la saman nomon:

Gunnard Kasson!

Ankaŭ malsanuloj elparoladis ĝin, kvankam multaj en alta febro eĉ ne sciis, pri kio temas. Sed la lignaj dometoj estis tiel plenplenigitaj per tiu ĉi nomo, ke la voĉoj de la malsanuloj estis la nura eĥo.

“Ĉu li ankoraŭ ne alvenis, sinjoro doktoro?” bonvenigis lin.

“Ankoraŭ ne.”

“Kaj kion vi pensas . . . ĉu li alvenos?”

“Ni devas esperi, amikoj! Nur tio restas al ni.”

Antaŭ tagmezo la ŝerifo vizitis la poŝtoŝtacion.

“Sinjoro Smith, kontaktigu min kun Unalakliko!”

“Volonte . . . tuj!—Preta!”

La ŝerifo enmanigis la aŭdilon.

“Halo, ĉi tie ŝerifo de Nome. Ĉu vi scias nenion pri Kasson?—Ne?—Kaj vi diras, ke li devus esti ĉi tie jam matene?—Ne, ni scias tute nenion. Jes, mi aranĝos tion. Mi ankaŭ havis similan ideon, pro tio mi vokis vin.—Mi dankas—jes, dankon!” La ŝerifo demetis la aŭdilon kaj eliris sur la

placon, kie staris kelkaj viroj en vigla debato. Kiam ili ekvidis lin, ili rapidis al li.

“Ŝerifo, ĵus ni parolis pri tio, ke ni devus ion entrepreni . . . ”

“Rilate Kasson ?”

“Jes.”

“Bonege, amikoj ! Mi almenaŭ ne estas devigata longe rakonti al vi, se vi mem venas kun tiu propono. Mi ĵus interkonsentis kun Unalakliko, ke ni serĉos lin. Ni kaj ankaŭ ili.”

“Tio estos la plej bona,” kapjesis Davison. “Nia devo estas malebligi, ke la stafeto fiasku en la lasta momento.”

“Amikoj,” diris la ŝerifo, “disiru hejmen, preparu viajn sledojn kaj hundojn kaj post kvaronhoro ni forveturos.”

La viroj volonte diskuris hejmen. Post dek minutoj staris antaŭ la hotelo dek kvin veturantoj kun siaj jungaĵoj.

“Kien vi veturos ?” demandis ilin tiuj, kiuj hazarde preterpasis sur la strato.

“Serĉi Kasson.”

La sciigo flugis be buŝo al buŝo kaj post nelonge la tuta urbo sciis, ke oni aranĝas ekspedicion, kiu veturos serĉi Kasson. Ĉiu volis akompani la savontojn. Ĉiu volis ŝanĝi la horojn de doloriga atendo en energian faron. Estis ja malgranda espero, ke ili renkontos lin—la maro estas vasta kaj glaciblokoj malebligas ĉirkaŭrigardon !—sed tio estis tamen miloble pli bona ol senfara irado sur la bordo kun la unusola penso : Ĉu li alvenos ? Ĉu li ne alvenos ?

Kaj tiamaniere la ekspedicio duobligis.

Tiuj, kiuj eksciis pri la afero poste, rapidege sekvis la forveturantojn. Sur la bordo de Norton-golfo ĉiuj haltis.

“Ni faros tri grupojn,” diris la ŝerifo. “Unu, sub la gvido de Davison, veturos laŭ la bordo. La duan gvidos Friman. Tiu veturos per granda arko dekstren. Kun la tria grupo veturos mi ; ni veturos en la mezo.”

“Estos bone, se la grupoj etendos sin je unuopuloj, por ke ni ĉion vidu,” proponis Friman.

Ĉiuj konsentis.

“Kaj ankoraŭ ion,” rememorigis Davison. “Se iu grupo trovos Kasson, ĝi tuj donu signon al la ceteraj per trifoje ripetata pafo.”

“Ĝuste,” konsentis la ŝerifo.

“Multan sukceson !” kriis viroj kaj la tri grupoj ekveturis antaŭen. Ĵurnalisto Hilton aliĝis al la grupo de la ŝerifo.

Ili veturis ĉirkaŭ duonhoron, kiam la ŝerifo donis signon por halto.

“Ĉu vi aŭdis ?” vokis li.

“Jes.”

“oni pafas tie !”

“Kaj tio estas rekte antaŭ ni !”

“Antaŭen !” ordonis mallonge la ŝerifo.

Ho, kia veturo ĝi estis !

Kaj denove—aŭdu !

Krak ! Krak !

Nenia dubo. Gunnard Kasson—kiu alia ĝi povus esti?—estis en danĝero!

Kaj subite la pafoj ĉesis . . .

La viroj embarasite rigardis unu la alian. Kaj poste, kvazaŭ per komuna penso, instigis la hundojn. La sledoj ekveturis pli rapide.

Post nelonge ili atingis la glaciblokon, kiu malebligis al ili la rigardon antaŭen. La hundoj ekkuregis al la sovaĝa atako sur la pinton de la glacia malhelpaĵo.

La plej multaj glitis sensukcese returne. Sed kelkaj veturantoj sukcesis atingi la pinton je la unua fojo. Inter ĉi tiuj estis ankaŭ la ŝerifo.

Tio, kion ili ekvidis de la pinto de la glacibloko, plenigis ilin per teruro.

Malsupre, ĝuste sub ili, staris kun larĝe dismetitaj kruroj Kasson. En la manoj li tenis la sledon kaj plenforte svingis per ĝi. Apud liaj kruroj kuŝis kelkaj kadavroj, sed pluaj bestoj atakis ĉiam pli sovaĝe.

“Pafu!” ekkriis la ŝerifo. “Sed atentu la hundojn!”

Super la glacia ebenaĵo krakis pafoj. Kelkaj lupoj restis kuŝantaj. Kaj nova pafaro duonigis la nombron de la atakantoj.

La ceteraj lupoj unue bataleme ĉirkaŭrigardis por konstati de kie venas la neatendita katastrofo kaj kiam ili ekvidis la homojn, ili forkuris.

La surprizitaj hundoj komencis ilin persekuti, sed kiam vokis ilin Kasson, ili tuj obeeme revenis. El dek du hundoj restis vivantaj nur kvin. Kaj ĉiuj estis malbele morditaj, plej multe Fulmo.

Gunnard Kasson rigardis siajn liberigintojn kaj ridetis. Poste li demetis la vilan ĉapon kaj viŝis sian ŝvitplenan frunton. Nur nun li sentis, ke liaj fortoj estas ĉe la fino.

“Kasson—,” alparolis lin la ŝerifo, sed pluaj vortoj restis en la gorgo. Li estis kortuŝita, kiel neniam antaŭe en sia tuta vivo.

Ankaŭ la ceteraj viroj silentis. Ili sentis la grandecon de tiu ĉi momento kaj ne volis ĝin rompi per vanaj vortoj. Ili dankeme rigardis la heroan viron, kiu riskis sian vivon por savi ilian urbon.

“Mi scias,” ekridis Kasson kaj sincere premis iliajn manojn. La ŝerifo elpoŝigis botelon, en kiu estis refreŝiga trinkaĵo. Kasson longe trinkis.

“Kaj—por la hundoj . . . vi havas ion?” li demandis.

Kelkaj viroj kompleze malfermis valizojn kun viando. La vunditaj hundoj avide ekmanĝis.

Nur nun Kasson rimarkis, kiel malbone ili aspektas. La viroj helpis al li flegi ilin kaj poste metis ilin sur siajn sledojn.

Poste ĉiuj rigardis en senvorta admiro la malgrandan paketon. Tiu ĉi rigardo rememorigis ilin, kiel malpacience ili estas hejme atendataj.

Al la sledo de Kasson ili jungis kelkajn el siaj hundoj—kaj trifoje ripetita pafo sciigis la ceterajn grupojn, ke la savita sero estas survoje al la urbo.

X. Atingita celo

TUTAN semajnon gepatroj retenis siajn infanojn hejme por ŝirmi ilin kontraŭ la malsano. Sed hodiaŭ ĉiuj estis tiom ekscititaj, ke ili forgesis ĉiun singardon. Knaboj tuj eluzis la ekscitiĝon de la maturaj homoj kaj elkuris eksteren. Plej volonte ili partoprenus la ekspedicion serĉantan

Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ



Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo, kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Ne-Esperantaj Kongresoj

Sufiĉe ofte Esperantistoj ĉeestas internaciajn kunvenojn aŭ kongresojn pri iuj ajn temoj (scienco, politiko, profesio, k.t.p.) Nur tute hazarde ili povas renkonti Esperantistojn en tiuj kunvenoj.

Mi miras multe, ĉar ne estas en *Esperanto* speciala rubriko pri tio. En tiu rubriko, la koncernataj Esperantistoj povus senpage anonci sian baldaŭan ĉeeston al tiaj kongresoj, indikante sian adreson por eventuala antaŭ-kontakto kun aliaj Esperantistoj ĉeestontoj. Tio ankaŭ eble faciligus Esperanto-agadon ĉe la organizantoj.

A. Frangeul, Francujo.

★ La sugesto ŝajnas havi bonajn eblecojn ; sed estas parte afero de spaco en *Esperanto*. Ni provu ! Informoj devas atingi la oficejon de UEA minimume unu monaton antaŭ la dato de la gazeto.

Pri “brogi”

Zamenhof evidente trovis la germanan *brühen* plej adaptebla. Kiel skribi ĝin esperante ? Germanan *ü* Zamenhof kutime anstataŭigis per *u* en Esperanto (G. *früh*—E. frua ;

G. *schütten*—E. ŝuti). Laŭ tiu procedmaniero ni havus la formon *bruhi*, kiu tamen estas tute neakceptebla el fonetika vidpunkto : pluraj popoloj tre malforte prononcas *h* ; inter du vokaloj ĝi preskaŭ malaperus (neniu esperanta radiko finiĝas per *h* !). La ĵusformita formo tro similus al *brui*. Kiam Zamenhof en aliaj vortoj devis ŝanĝi nesonan konsonanton, li prefere elektis la respondan sonanton (ekz. *agordi* el *k*, *bufedo* el *t*). Laŭ la rusa modelo menciita de S-ro Gerdman sin prezentis *g* kiel sona kaj tial pli klara anstataŭanto de *h*. Ni do havus la formon *brugi*. La *o* estas pli malfacile klarigebla. Sed ĉu oni ne povas konjekti, ke Zamenhof konis la parencecon de *brühen* al G. *brodeln* “boli” ; A. *broth* “buljono” ; I. *brodo* “buljono” kaj fine elektis tiun vokalon, per tio plivastigante la etimologian bazon de la esperanta vorto ? Tiaj “miksitaj” formoj ne estis fremdaj al la lingva konstrumetodo de Zamenhof. Mi mencias nur *rabi* el G. *rauben* kaj F. *ravir*, spegulo el G. *Spiegel* kaj L. *speculum*.

Ebbe Vilborg.

Kasson, sed ili bone sciis, ke la maturaĝuloj ne permesus tion. Pro tio ili sekvis la forveturantajn virojn almenaŭ per siaj rigardoj kaj post ilia forveturo ili pacience atendis sur la bordo de la maro.

“Brr ! Tio estas malvarmego ! Ludu ni ion !” proponis Georgo Welch.

“Kion ?”

“Ni aranĝu stafeton !”

daŭrigota



ESPERANTO KAJ RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Dimanĉo	18.00–18.15	Sofia. 39.11m. I. Radio Sofia, Bulgarujo.
Lundo	07.15–07.30	Stockholm. 19.80m., 49.46m. P.
	15.15–15.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7, Svedlando.
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
	22.20–22.40	Hilversum, 298m. kaj 188m. I. (ĉiun duan lundon) : V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	00.45–01.00	Bauru. 91m., 240m. K. I. Radio Bauru, Brazilo.
	01.15–01.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P.
	07.45–08.00	Lille. 235m. K. I. Esperanto, 94, rue de la Rochelle, Tourcoing, (Nord), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern.
	13.45–14.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	22.15–22.30	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América, Guatemala Cd., C. Ameriko.
Merkredo	17.30–17.50	Roma. 25.40m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Ĵaŭdo	08.30–08.45	Paris. 445m. K.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	13.45–14.00	Rio de Janeiro. Kiel marde.
	17.10–17.25	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan ĵaŭdon).
	17.35–17.40	Bern. Kiel lunde. P. D-ro Privat.
Vendredo	17.30–17.50	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m. P. (nur la unuan vendredon de ĉiu monato). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
	22.30–23.00	Hilversum. Kiel lunde.
Sabato	20.00–20.15	Sofia. 39.11m. I.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 242

2-an de Oktobro 1951

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la 30a de Septembro, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1950 :

	1950	1951
Asociaj membroj	7092	7363
Individuaj membroj :		
MJ	861	874
MA	4215	4505
MS	288	277
Patronoj ..	15	16
DM	207	230
HM	59	59
	5645	5961
	12737	13324

DELEGITOJ

Britujo

Canterbury. D : vakas.

FD (Kvakerismo) : A. G. Tucker, Birchcroft, Pilgrims' Way, Harbledown, Canterbury.

Helensburgh (Dumbartonshire). D : F-ino A. A. Nicol, 'Fistral', 30 Henry Bell St.

Danlando

Ødis. D kaj FD : vakas.

Øster Starup. D : Heinrich Michels, Fredsted pr. Viuf.

FD (Psikologio) : La D.

Francujo

Alès (Gard). D : S-ino M. L. Lanoux, rue Lafare 11.

Germanujo

M. Gladbach. D : K. A. Metzkes, Burggrafenstr. 52.

Weiden. D : M. Leipold, Siechenstr. 29-II. Tel : 332.

Hispanujo

Valencia. FD (Skoltismo) : F. I. Sanfeliz, Marques de Caro 10-5a. Tel : 52865.

Jugoslavujo

Zemun. FD (Metalurgio) : vakas.

Kubo

San Antonio de Los Baños. D : O. Marrero, Sandalio Camblot 7.

Nederlando

Bolsward. D : vakas.

Nov-Zelando

Auckland. FD (Folkloro) : D-ro J. Hamvai, 4 Parau St., Mt. Roskill.

Pollando

Pruszcz Gdanski. D : vakas.

Svedujo

Åstorp. D : vakas.

Bengtfors. D : S-ino T. Winberg-Rosell, Södra Vägen 27. Tel : 424.

Venezuelo

Maracaibo. D kaj FD : vakas.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Glennie, F-ino C. M., London, Anglujo
Anderson, B. E. S., Danbury, Anglujo
Nicol, F-ino A. A., Helensburgh, Skotlando
Magnusson, O. S., Reykjavik, Islando
Bjarnason, J., Reykjavik, Islando
Haraldsson, P., Reykjavik, Islando

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1951

281. Tell, S-ro L., Stora Essingen, Svedujo
282. Ullrich, S-ro W., Wien, Aŭstrujo

DONACOJ. J. J. W. Huysman 38\$. 6p.,
A. G. Tucker £5, T. J. Gueritte £20.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

El la redakcio

S-ino Nora Holmes, Londono, atentigis nin rilate je aperinta artikolo (Julia n-ro, p. 201) :

Conan Doyle, en sia libro *The New Revelation and the Vital Message* klarigas kiel li partoprenis seancojn en 1887 kaj fariĝis ano de The Psychical Research Society (La Psika Esplora Societo) en 1891.

Tio neas la diron de Francois Hayotte en *Memorigo pri ne-ekzistinto* 'La filo de Doyle mortis en la unua mondmilito kaj tio kunhelpis, ke Doyle fariĝis spiritisto'.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Kaj mi donas al ili eternan vivon ; kaj ili neniam pereos, kaj neniu ilin forkaptos el mia mano. S-ta Johano 10.28.

Gelernantoj (10–14 jaraj) serĉas geamikojn en la tuta mondo por interŝanĝi pm. Geinstruitoj kaj gelernantoj skribu al : Esperanto-klubo "La Blanka Lernejo", Middenweg 49, Noord Beemster, Nederlando.

Antonio Pastor, Ercilla 49, 5, Bilbao, Hispanujo, deziras interŝanĝi il. pk. kun ĉiuj landoj. Ĉiam respondos.

AAAAAAAAlt ! Legu Jarlibron pĝ. 55.

Dum solena koncerto okaze de la naskiĝdatreveno de d-ro Zamenhof, grandnombro da novaj Esperantistoj aliĝos al Esperantujo.. La gesamideanoj tutmondaj estas kore petataj salutskribi kaj sin deklari pretaj por korespondado. Otto Fuchs, Blumenhagenstr. 7A, Hannover, Germanujo.

Essen, la koro de la germana karbminea regiono, invitas la tutan mondon korespondi reciproke kaj viziti ĝin. Tranokteblecoj laŭplaĉe en malmultekostaj aŭ luksaj hoteloj aŭ ĉe samideanoj. Vizitservo konigos la mirindan ĉirkaŭaĵon. Skribu al D-ro Wegener, Hollestr. 1, Essen, Germanujo.

Somero 1952. Geedzoj aŭ du amikinoj kiuj deziras someran libertempon ĉe farmbieno "au pair" skribu al S-ro Hickson, Cauldron Barn Farm, Swanage, Anglujo.

Roman Glückher, Brauneggerstr. 38, Konstanz, Germanujo, deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj. Respondo garantiita.

Mi deziras aĉeti la 1-an volumon de la *Fabeloj de Andersen* en bona stato. Proponojn faru al s-no Agustin J. Palacios, E. S. Zeballos 20, Rosario, Argentino. Mi respondos al ĉiu proponinto.

Esperanta sanulejo estas fondota, kie oni povas vivi kaj lerni plejeble fariĝi centjara. Kiu sendos donacon por la sanulejo povos demandi laŭplaĉe. Volonte respondos D-ro Wegener, Hollestr. 1, Essen, Germanujo.

3 hispanaj lernantoj ŝatus korespondi kun tutmondaj gesamideanoj letere aŭ poŝt-

karte, pri ĉiuj temoj. Adreso : José L. Aldeguer, Torrente Vidalet 42—I, Barcelona 12, Hispanujo.

Letervesperon je la 15-a de Decembro organizos sekcio de L.E.E.N. en Hoogezand-Sappemeer. Ĝojigu nin per multaj leteroj, poŝtkartoj kaj aliaj presaĵoj. Ni certe respondos. Sekr. : M. Abbas, Borgercompagniestr. 60, Sappemeer, Nederlando.

Esperantista Klubo, 1 Beaconsfield Terrace, Town End, Bodmin, Cornwall, Anglujo, interŝanĝos leterojn, poŝtkartojn, kaj poŝtmarkojn kun ĉiulandaj Esperantistoj.

Praktikaj kaj belaj vestaĵoj por infanoj. Mi petas sendi al mi diversajn modĵurnalojn, speciale por infanoj kaj prefere kun modeloj. Interŝanĝe mi kompensas per finnaj modĵurnaloj aŭ laŭ deziro. S-ro Erkki Järkäs, Sotkankatu 15a, Tampere, Finnlando.

Esperanto-klubo de Laborista Instituto, Tampere, Työväenopisto, Finnlando, aranĝos komence de januaro 1952 letervesperon. Bonvolu skribi multnombro ! Respondo garantiata.

S-ro Americo Elias Rebelo, Caixa Postal 835, Luanda, Angola, Portugala Okc.-Afriko, deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj.

S-ro Hermenegildo Rodrigues de Gouveia, Caixa Postal 571, Luanda, Angola, Portugala Okc.-Afriko, deziras korespondi per leteroj kaj ilustritaj poŝtkartoj.

Du flegistoj deziras korespondi per bildkartoj kaj gazetoj kun la tuta mondo. Skribu al Feliciano Marques aŭ Vergilio Duarte Ribeiro, Hospital Julio de Matos, Lisboa, Portugalujo.

João Artur de Paiva, Arraiolos, Lisboa, Portugalujo, deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj. Certe respondos.

Eldonota Esperanto-verko senpage estos sendata al ĉiu, kiu sendos al ni nacilingvajn karikatur- kaj anekdotĵurnalojn, kaj kies materialo aperos en la kompilota esperantlingva verko pri internacia bonhumoro kaj karikaturarto. Internacia Bonhumoro, Strindbergsvej 36, København Valby, Danujo.

KARTA ENCIKLOPEDIO (Kulturhistoriaj kuriozaĵoj)

16 kartoĵoj jam aperis kaj kostas 2ŝ., aŭfranko 2p.

Mendu ĉe : U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

LIBROJ EL JAPANUJO

NUN HAVEBLAJ

		ŝ.	p.
Granda Lernado kaj Doktrino de Mezeco ..	102 paĝoj, broŝ.	2	0
La unuaj libroj de Konfuciana Biblio, tradukitaj de Kiuiĉi Nohara			
Legolibro de Esperantaj Fabeloj	44 paĝoj, broŝ.	1	3
Kompilis Joŝiŝi Ŝimomura ; Reviziis K. Kalocsay			
Leteroj el mia muelejo	80 paĝoj, broŝ.	2	6
Alphonse Daudet (Miĵake-Ŝihej)			
La Libro-konstantaĵo de Fila Pieco ..	44 paĝoj, broŝ.	1	3
Esenco de la praktika etiko de Konfuciismo Tradukita de Kiuiĉa Nohara el Ĉinlingva originalo			
La Sukhavativjuho (Budha sankta skribo) ...	24 paĝoj, broŝ.	1	3
Tradukita de Kiuiĉi Nohara el la sanskrita originalo			
Verda Parnaso	128 paĝoj, broŝ.	3	0
I.U. Originalaj kaj tradukitaj poemoj			
Verkoj de D-ro Nakamura	108 paĝoj, broŝ.	3	0
Sciencaj artikoloj, paroladoj, kaj rakontoj			
Zinnoo Sĵootoo Ki.	208 paĝoj, bind.	3	6
Tradukis K. Nohara La historio de la Japana imperiestra trono			

Aldonu 10% por afranko

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo